

Sennacieca Revuo



Oficiala Organo
de Sennacieca Asocio Tutmonda

LITERATUR-SCIENCA ALDONO

Antaŭe "La Nova Epoko"

ENHAVO:

L. Sejfullina: Aleksandro Macedona. Trad. Nikodem. — *E. Toller*: La transformiĝo. Trad. H. Remers. — *Tagulo*: Hirundo. Vers. — *M. Lallemand*: La lamenigilo. Trad. L. R. — *E. Miĥalski*: En forĝejo. Vers. — *L. Revo*: Niaj literaturaj taskoj. — *Prof. D. Carbone*: La macerado de la tekseblaj kreskaĵoj.

Redakcio: 1-a Tverskaja-Jamskaja, 35, kv. 5, Moskvo I (Rusio)
Administracio: R. Lerchner, Colmstrasse 1, III., Leipzig-Stötteritz (Germ.)

REDAKCIA ANGULO

Nur tri monatoj pasis dekiam ni eklaboris super nia "Aldono", sed vere ni povas jam ĝoji pro abunda artikolaro, veninta kaj venanta al la redaktejo. Sed ĉu ne estas danĝere deklari pri tiu abundo? Ja, unuflanke, nia k.do administranto povus ektimi, ke tiu abundo naskos ĉe ni la deziron pliampleksigi la "Aldonon", dum liaj ciferoj montras, ke por la pliampleksigo necesas krom bona alfluo de susuranta manuskriptaro ankaŭ (kaj ĉefe) bona alveno de sonoranta mono. Li estu do trankvila: ni bone scias, ke lia devizo estas "ŝparemo", kiun li turnas al la redaktantoj (estu ŝparemaj en la revuamplekso!), samkiel al la kunmembroj (ŝparu, ĉiam ŝparu kaj donacu la ŝparitaĵojn por la revuoj!). — Kaj ĉe la kunlaborantoj niaj vortoj pri la abundo povus naski heziton, ĉu ili daŭrigu sian verkadon, ĉu ĝi ne estos senrezulta. Ankaŭ ilin ni trankviligu: ilin ne timigu daŭra neapero de iliaj verkoj; — ja literaturo estas arta respiegulo de l'vivo — kiel respiegulo, ĝi ĉiam postsekvas la okazantaĵojn, do esence ĝi ne havas aktualon de l'momento; kaj kiel arteca ĝi ja longe konservas sian valoron. Kaj nia tasko estas doni en ĉiu kajero la verkojn en tia agordo, ke ili kompletigante unu la alian per siaj ideoj, formu kune plejan impreson ĉe la leganto, ili — la verkoj — prezentas el si kvazaŭ diversajn sonojn, kiuj estas per si mem belaj, sed kiuj pleje belsonas en akordo. Ni zorgas ke ĉiu numero nia estu tia literatura akordo — ĉu ni ĉiam sukcesas, juĝu legantoj. Sekve k.doj havu paciencon, atendante aperon de sia verko; cetere la presotajn ni ja notas en nia "angulo".

Inter la lastaj ni jam notu tradukaĵon de k.do *L. Bergiers* el verko de *Pierre Broodcoorens*; la promesitan fragmenton el "*Boule Carcasse*" de l'sama aŭtoro ni atendas. Bela estas fragmento el "*Flamoj*" de *St. Brzozowski*, tradukita de k.do *I. Jurysta* — ni ĝin rezervas por la marta numero; tradukoj de k.do *Otto Sall* el *Fr. Tuglas* aperos jam en proksima numero. Tradukaĵojn de k.doj *H. Stay* kaj *K. Johanson* ni ankaŭ utiligos, sed la lastan k.don ni petas indiki aŭtoron de l'verketo ("Se mi estus patrino"). Taŭga estas originala poemeto de k.do *H. Rottermann*.

El artikoloj, venintaj por scienca parto, ni notu originalajn (cetere tiujn ni ĉiam pleje preferas) de k.do *E. Ajzberg* (aperos en februara numero) kaj de k.do *W. Thielking*. Iom prokrastigita aŭtoreferato de k.do *S. Parhomenko* tamen aperos. Interesa lingva studo de k.do *M. Krjukov* certe aperos, sed k.do havu paciencon, ja amplekso de nia "Aldono" ne estas sufiĉa, por ĝin presi tuje; samon ni diru pri artikoleto de k.do *Br. Mirski*.

La Redakcio.

Al atento de Rusiaj k.doj. De Januaro 1924 estas fiksitaj jenaj prezoj por S.A.T.-eldonaĵoj en rusia ora valuto: *Goethe, Faŭsto I.* — 60 kop., *H. Barbusse. Eklumo en la abismo* — 45 kop., *Ni legu* — 50 kop., *L. Tolstoj, Tri verkoj* — 30 kop., *Dokumentoj de Komunismo* — 60 kop., *Komun. Manif.* — 20 kop., *For la neŭtralismon* — 12 kop. La prezoj estas montritaj sen afranko kaj validas ĝis plua ŝanĝo. Rusiaj k.doj kaj esp. organizaĵoj povas mendi senpere ĉe "*La Nova Epoko*" (1-a Tverskaja-Jamskaja, 35, kv. 5, Moskvo I). Membroj de S.A.T., montrantaj numeron de sia membrokarto, rajtas ricevi po unu ekzemplero de ĉiu eldonaĵo kun 20% rabato.

La administranto Lerchner.



ALEKSANDRO MACEDONA

2)

L. SEJFULLINA

(Daŭrigo)

La urbo sidis en la stepo. En ĝi estas grasaj loĝantoj: tataroj kaj rusoj. La loĝantoj havas multan brutaron kaj tritikon. Pro tio ili marŝas sur la larĝaj nepavimitaj stratoj de sia urbo nerapidece, balance. Ili ŝatas vastan veston kaj fortikajn naskkapablajn edzinojn. Ili ŝatas sian frukto-donan teron. Pro tio eĉ la duetaĝaj domoj en la urbo estas malalte larĝetaj. En la domoj estas multaj lanugmatracoj kaj kusenoj. Ĉiam odoras preta grasa tagmanĝo. Regas en la domoj trankvila dormema malvigleco.

Multaj estas en la urbo kolbasejoj kaj gastronomiaj magazenoj. Lernolibrojn kaj songdivenajn librojn vendas negocisto de ikonoj, elprenante ilin el sub la bildoj de l'Savanto kaj de sanktuloj. Biblioteko trovis rifuĝejon ĉe la korto de l'fajrobrigadejo. Svarmas en ĝi gimnazianinoj: petas la librojn de l'verkistino Verbickaja¹⁾ kaj reallernejanoj disputas inter si la vicon por la verkoj de Louis Boussenard²⁾. La maturaĝuloj, librojn ne legas; kvankam multaj abonas la "Patrolandon" kaj la "Grenkampon"³⁾ kun la aldonoj. Incitas la sangon nur la kartkaj lotoludo en la publika klubo kaj dum gastvizitoj de unuj ĉe la aliaj.

Laŭ la fervojo foriras el la urbo vagonoj kun faruno, ledo kaj lardo. Alvenas ili kun teo, manufakturo kaj fiŝaĵo. Laŭ la larĝa vojo el urbo urbon trenas sin nerapidemaj kameloj kun pezaj pakaĵoj. Kaj la vico de tagoj forpasas, en la ĉenon de vivo eniĝante, trankvile, per sateco ŝarĝita kiel ĉi tiu kamelkaravano. Per ringo la urbon forŝlosis de alies bruo la grasa stepo. Kaj ŝajnas, oni mortas tie ĉi nur pro la tromanĝado kaj maljuneco.

Dum festoj, kiuj estas oftaj, ĉar la urbo respektas ankaŭ malgrandajn sanktulojn, — daŭre staras super la domoj la densa sonorado el rondaj nealtaj preĝejoj. Dum la horoj de tatara preĝado same dense kaj bonanime krias al Alaĥo de sur la moskeminaretoj fortikaj maljunuloj — mulaoj. Kaj la dio de ĉi-urbo estas glata, ruĝvanga kaj per kolero sin maltrankviligi ne ŝatas.

Sed al Elizabenjo ne donis satecon la urbo. Ĉiam vakse palaj la vangoj kaj la haŭto suroste streĉita. Nur la parolo pli flua fariĝis. La patrino pli maldolĉe estis ekspiranta:

(1) Multlegita antaŭ la revolucio bulvardromana rusa verkistino.

(2) Konata franca aventurromanisto.

(3) Plej disvastigitaj antaŭ la revolucio ilustritaj semajnaj gazetoj en Rusio.

— Ĉiam ŝi, versajne, en la libron rigardas. Librece paroli ŝi komencis. Jen allogaĵo malbenita!

Kaj la patro estis rememoranta, kiel mem li super la libro penis, kaj per timema rideto li kvazaŭ petis pardonon por si kaj por la filino.

III.

Ne fingardis la sata, dormema dio. Disrompiĝis la trankvilo. La dika Ivan Makaroviĉ, unuagildiulo¹⁾, pufiĝante kaj spirblovante viŝis per granda tuko la rondan kalvaĵon. Li parolis al Safiullo Iŝmuratov:

— La caron for, Rodzjanko'n²⁾ for, Kerenski eksen!. Ĝis kio ili baraktos?

Mallarĝigis siajn ruzajn okulojn Safiullo. La ĉapeton pli supren ŝovis, plendis:

— La teo dumvoje perdiĝis. Malprofito multa. Iom — iom estas tempo la liberon fini!

— Rigardu, ke oni nin ne finu! Senbridiĝis la popolo.

Kaj li estis profetinta. Komencis la bolŝevikoj estri. Kriado komenciĝis ankaŭ ĉe la uzino de Ŝidlovski. Elektoj diversaj kaj laborista kontrolo. Por Ŝidlovski, kvankam neplena, sed, ŝajne, eksigo. En la urbo li pli multe loĝi komencis. Kaj Elinjo ofte estis el la urbo alveturanta al sia patro dum tiuj ĉi tagoj tumultaj. Deklaris ŝi:

— Mi, paĉjo, estas de la partio bolŝevika.

La patro nenion diris, kaj la patrino ekploris. La kurachelpanto ŝin timigis. Multon pri la bolŝevikoj, varme kaj kolere, li rakontis. Kun granda posedaĵo estis la homo. Malordon bolŝevikan li timis.

Elinjo miris:

— Kio estas al vi, panjo? Kion vi ektimis? Ha?

Ŝi rigardis al la maltrankvila, antaŭtempe maljuniĝinta, vizaĝo de la patrino kaj ĉirkaŭprenis ŝin:

— Maljuneta vi mia...

La patrino pro la kareso neatendita ankoraŭ pli multe maltrankviliĝis. Dekiam elkreskis, Elinjo ne karesis. Konfuziĝis ŝi. Ne povis ŝi la filinon insulti. Nur, ploretante, demandis ŝi:

— Elizabenjo, ĉu ankaŭ la dio estas neniigata?

Elinjo ekridis:

— Por kio vi kompatas ĝin? Sub ĝia protekto ni ne vivis.

La vortoj koleraĵ. Kaj la vizaĝo de l'knabino — luma. Macedona ne vortojn, sed lumon tiun ĉi kaptis. Mem li lumiĝis. Unuafoje, protekteme — kiel ĉefulo en la domo — sian edzinon li ekrigardis. Malfortiĝis la patrino. La ĝojon de la filino ne vidas. Certatone li trankviligis:

— Ne ploru, elkreskis la infanoj; kien flugi — ili mem scias.

Enlogis Elinjo la patron. La kunvenojn viziti li komencis. Por homoj maltrankvilo kaj konsumiĝo, sed la patro kaj la filino ŝajne

(1) Komercisto unuaranga.

(2) Prezidinto de l'Regna Dumo (parlamento).

resaniĝas. Ŝia rigardo estas vigla. La sango pli ofte per purpuro la vizaĝon vivigas. La dorso de Macedona ankaŭ pli rekta fariĝis. Malpli ofte li palpebrumis la okulojn. En la bieno pli aŭdebla estas lia voĉo. En deputitojn de l'urba Soveto li trafis. En la deputitlisto plennome oni skribis: Aleksandro Elizaroviĉ Macedona. En la patronomon eraro enŝoviĝis. Nu, kio do! Aleksandroj Macedonaj pluarj mankas, aliel oni ne mokus tiel pli antaŭe. Sekve, li estas. Kaj ĉu oni povas memori nun: ĉu Elizaryĉ, ĉu Eŭdokimyĉ? Negranda li estas birdo; kvankam aliel, sed oni ekestimis lin!

En ĵurnalo sian nomon presita li vidis, unuafoje li tutvigliĝis. Ĉiam modestece li haron al haro estis sur la kapo glatiganta. Kaj nun kun la ĵurnalo li hejmen alkuris: la haroj diversflanken, la frunto malseka. En la okuloj ĉu timo, ĉu proĝoja stultiĝo. La edzino ektimis:

— Oni batis vin, ĉu?

— En la Soveton, Anjo, oni elektis min. Jen rigardu! Oni enpresis: Aleksandro Elizaroviĉ Macedona. Tio estas, necesus skribi Eŭdokimoviĉ, sed preseraro okazis!

— "Preseraro"! Zorgu, ke oni sur via nukokolo preseraron ne faru. Kaj kien li sin ŝovas, kien li sin ŝovas, dio-patreto? Sur lia ĝibo la seso, kaj li: en Soveton! Ĝisvivis li malbrue la maljunecon, sed dum maljuneco ovoj instruis la kokinon. Post Elinjaĉo li sin ek-trenis. Sed kio ĝi estos, kio ĝi estos?

Por tuta tago ŝi komencis la plendadon larmeman. La voĉo estas knaranta, kiel ĉe la patrino mortinta. Similas ĉiuj virinoj unu al la alia, la ploremaj. Sed Elinjo distinga fariĝis. Rememoris li pri la filino, lumo aperis sur la vizaĝo. Kaj la edzinon li ekkompatis:

— Ne maltrankviligu vin, Anjo. Neniu timindaĵo estas tie ĉi. Estimo granda. Kiu mi estas? Tio estas, kiu mi estis? Kaj nun — membro de la Soveto. Tio estas: kun aliaj laboruloj la urbon mi gvidas.

— Gvidanto! Videble estas, per kio vi plaĉis. Ĉu per vizaĝaĉo, ĉu per haŭtaĉo! Tiaj gvidantoj ja necesejojn sinjorajn estis purigantaj. La knabinon en la urbo oni de la prudento forŝovis... Alia patro timigus ŝin, kaj tiu ĉi mem de ŝi estas trenata! Unu furunko estis en la familio, nun du...

Kaj subite haltis ŝi. Ne vidis ŝi ankoraŭ tian vizaĝon ĉe la edzo. Blankiĝis li tuta, fikse ekrigardis kaj per la mano ekfrapis la tablon. Kvazaŭ eĉ ne li estas.

— Vi Elinjon ne tuŝu! Eble nur unu bonaĵon ni faris, ke ŝin ni naskis...

Ne finis li la penson. Svingis li la brakon, malfortiĝis. Denove per malaroga, ordinara voĉo li finis:

— Malsupereco nia alpremas nin, Anjo! Mi kun ĝojo estis venanta al vi... Kiel nomfestanto... Nu, bone do. Kaj vere, vane mi kokiĝis. Kie estas la hakilo? Mi iru la lignon haki.

Ŝi rigardis, kiel kliniĝis li denove, kiel rapideme estis surmetanta li malnovan vatan paltaĉon, ekbruligis kompato la koron.

— Vi, Aleĉjo, ripozu. Mi kun Peĉjo hakos. Vi nun aliajn aferojn havas. Ĉu en la urbo loĝi vi devos?

Ŝi deziris multajn vortojn diri al li. Ŝi deziris certigi: ĝojo kaj honoro, ke oni lin elektis. Sed la vortojn ŝi ne trovis. Mensogi ŝi ne scipovis. Timis ŝi pri li.

— Ne, iafoje nur mi veturos al la urbo. Vi ne maltrankviligu vin. Kaj li eliris.

Ŝi estus ĝoja ne maltrankviliĝi, sed kiel fari, se la maltrankvilo postsekvas? Elinjo en alian urbon pro aferoj iuj forveturis. Gaja ŝi estis veninta por adiaŭi.

— Paĉjo, oni vin tre laŭdas! Oni diras, vi estas trankvila, sed laborkapabla. Estas bone, ke vi tie ĉi en kooperativo laboras. Tie fremda elemento estas kaj al ni oni povas konfidi. Atendu, mi revenos! . . . Panjo, kial vi ĉiam konsumiĝas? Laciĝis vi! Ne grave, baldaŭ vi ripozos. Jen, atendu, mi revenos . . .

La okuloj de Elinjo pri la vivo ĝojas: varmegaj ili estas. Kaj sur la loko ŝi ne sidas. Ĉiam moviĝas ŝi, facila kaj rapida. Ili eliris sur la straton por akompani. Rigardĝuis la patrino. Maldika ŝi estas, sed kvazaŭ per hidrargo ŝi estas plenversita, kaj la purpuro delikata.

— Ĝis la revido! Atendu min!

La patrino ekploris mallaŭte kaj maldolĉe. Klare eniĝis en la memoron ĉio: la arboj kun malheliĝintaj folioj antaŭaŭtunaj, griza rubando de l'vojo kaj la maldika, en nigra palto, tia klarlinia ŝi en droŝko. Sur la vojkurbiĝo blanka tuketo en la mano gaje en la aeron ekflirtis, per ruĝa kovraĵo la kapo eksvingis.

Macedona ekridetis per mallaŭta sia rideto. La edzino pli forte ekploris. Li gardeme prenis ŝiajn ŝultrojn kaj turnigis ŝin al la hejmo. Mallaŭte, sed trankvile li diris:

— Ne nia estas la vico plori. Silentu. (Daŭrigota)

El rusa lingvo kun permeso de l'aŭtorino tradukis *Nikodem*.

LA TRANSFORMIĜO

ERNST TOLLER

(fragmento).

SESA BILDO

La kripluloj. Vasta ĉambrego, kies plafono ŝarĝas. Laŭvice starigitaj litoj, en kiuj kuŝas la kripluloj vestitaj per grizaj ĉemizoj. De ie venas sanitarsoldatoj.

La sanitarsoldatoj: Rekte starigitaj estas la litoj kiel ŝnuro, eĉ ne unu ĝenas la rektecon. Ni plenumis nian devon. Kviete — la kuracisto volu veni kaj vizito komenciĝu.

Eniras profesoro en vasta, malfermita mantelo, sub kiu estas videbla eleganta nigra redingoto. Sur lia kolo troviĝas kranio, kies okulokavoj briletas tra ora okulvitra kadro. Lin akompanas studentoj.

La profesoro: Jes, sinjoroj, ni estas imunaj kontraŭ ĉiaj teruraĵoj. Ni povas nomi nin pozitiva fako, dum la negativa estas la armil-industrio. Alivorte: ni estas la reprezentantoj de la sintezo, la armil-industrio agas analitike — la sinjoroj kemiistoj kaj inĝenieroj forĝu batalilojn kaj fabriku teruregajn gasojn — ni eltenas. Ili ricevas milit-procentegojn, sed ni, sinjoroj, ni malpretendemaj estas modestaj: al la savado — la laboro de kuracisto. Sed antaŭe, ol ni iros al la pacientoj, mi volas montri al vi inventaĵojn, kiuj sukcesis — mi diras ne sen fiero — per mia peno. Mi petas bonvole konduku la sep modelekzemplerojn antaŭ la blankan tolon.

Sanitarsoldatoj starigas kvadratan toltabulon blankan. Iu manĝegas. Kiel risort-streĉitaj maŝinoj alpaŝas de ie sep nudaj kripluloj. Iliaj korpoj estas senbrakaj kaj senkruraj. Sed ili havas artefaritajn nigrajn brakojn kaj kruojn, kiuj aŭtomate svingante moviĝas. Rektlinie kaj envice ili marŝas antaŭ la toltabulon. Sanitarsoldato komandas: *haltu!* La "sep" ekstaras kaj krako aŭdiĝas. Sanitarsoldato komandas: *maldekstren!* La "sep" turniĝas maldekstren. En ĉi momento eklumas blendlanterno jetante blankardantajn lumgarbojn al la "sep" kies vizaĝoj montras saman esprimon stereotipan.

La profesoro: Jen, sinjoroj, mi petas. Tie la ĝusta loko kie ili estas plej bone videblaj. Per nia scienco ĉi-homoj revekiĝis je nova vivo. Karnbuloj ili estis kaj nun denove viroj. Ĉu vi vidis, kun kiaj ĝojo kaj ekzakteco ili sekvis la ordonojn?! Ja, sinjoroj, nun ili estas rekondukitaj al nia ŝtato kaj ankaŭ al la homaro! Valoraj membroj de utila komuneco! Do kio nun al mi prosperis — hodiaŭ mi volas tion diri al vi — speciala mekanismo estas konstruita, tiuj personoj ree povas plenumi sian plej altan devon. Metodo sencplena estas kreita — naskiga povo estas atingita; ankaŭ edzecaj ĝuoj atendas ĉi-virojn.

Studento (vizaĝo de *Frederiko*) svenas. Sanitarsoldatoj donas al li akvon.

La profesoro (ridetante): Juna viro, sveninta ĉe la faro de la amo, kio do okazus sur la bataalkampo?!

La studento kovras la vizaĝon per ambaŭ manoj forirante. Senarbitre moviĝas liaj piedoj same aŭtomate, kiel la artefaritaj de la kripluloj. La elektra lampo estingiĝas. La profesoro, studentoj, kripluloj kaj sanitarsoldatoj malaperas. En lito iu blinda kriplulo rekte sidigas sin.

Blindulo: Diru, fratoj, ĉu vesperiĝis... ĉu noktiĝis... la nokto mildigas mian doloron. La nokto havas molajn malvarmetajn manojn kiuj karesas miajn okulkavojn per delikate ondantaj movoj. La tago estas kruela. Suno pikas. Mi ĝin sentas kiel sulfurmaron kiu kaŭterize mordas min per vaporoj...

Senbrakulo: Ĉu neniuj aŭdas min... mi vokas do kaj petas vin, karaj kamaradoj. Nur etan necesajon mi volus plenumi. Kiu helpas min, rapidu, mi petas vin... kuŝi en propra koto estas terure.

Spincerbvundito: Ĉu ĝenas vin iom da koto — ĉe mi tio fariĝis kutimo. Mi ne scias, ĉu mi ankoraŭ estas homo, ĉu viva latrino. Paralizita

estas mia intestaro kaj nur mia koro batas. Ĉu neniu ĉeestas kiu kapablas paralizi mian koron? Mi dronas en propra koto — pest-mortante kaj naŭzante min kaj vin. Mi malbenas la koron — mia animo jam mortis pro naŭzo — kaj nur mia koro estas sen kompatato. Kiam mi vekiĝis, diris la kuracisto: la kuglo tuŝis la spinan cerbon, sed via vivo restos. Estis moko, se tiu homo sciis kio atendas min, alikaze li estus devinta doni al mi rimedon ke mi mortu. Kaj se li ne sciis tion, tiam oni enkradigu lin en frenezulejo.

Vundito, kies korpo konstante estas skuata de konvulsioj teruraj: En frenezulejon, jes, malliberigu lin en frenezulejo — sed ne, sciu — alian rimedon mi scias. Metu lin en subterejon kaj ĉi-subterejon ruinigu per pafado. — Raĉ — krevis la grenado . . . mi ĉirkaŭrigardis . . . neniu forkurejo plu. Per miaj ungoj disgratis mi la frakasitajn bretojn — per mia buŝo mi manĝegis teron por lumen bor-mordi truon. Ho — multe da tero mi manĝis, neniam mi sciis ke tero tiel bone gustas. Tiam mi ekdormis. — Vekiĝante mi kaŝis tie ĉi. Ĉu tio estas la tero kiun mi manĝis, kiu min igas tiel konvulsii? Ĉu mi tro frue volis teriĝi kaj pro tio nun devas pentofari? Aŭ ĉu mi foriĝis de la tero, ĉu persekutas min ĝia venĝo? Kion ajn mi tenas en miaj manoj, tion mi verŝas — do mi verŝis mian sangon . . .

Gasvenenumito: Mia spiro estas pasero diranta ĉiam: pep . . . mia pulmo estas pasernesto . . . Ĉu vi povas diri al mi? Ankaŭ paseroj ekzistas laŭdire, kiuj flugas suden, kiam vintriĝas. Pep . . . pep . . .

Ĉiuj: Jen scias "propran kanton" ĉiu. Kantadu ni mikŝore.

De ie venas pastro (vizaĝo de *Frederiko*). Liaj manoj levitaj ĉirkaŭprenas krucifikson kiun li etendas kontraŭ la kripluloj.

La pastro: Kriston mi alportas, kompatindaj malsanuloj. Li konas viajn penadon kaj suferadon. Ho venu al li peze ŝarĝitaj. Li donas savon al vi, donas amon.

La kripluloj: Se li estas tiom ĉiopova, kial do li toleris tion? Kaj se li aprobis tiun "*ne demandu min pro kio*", kial do ni ankoraŭ devas vivi? Vi diras, li scias nian suferadon — sekve li estas malbona tial ke li ne helpas nin.

La pastro: Vi blasfemas.

La kripluloj: Vi riskas nomi nin blasfemantoj, — *li* blasfemas je ni, se li volas kredigi nin, ke li konas nian suferadon. Risku nomi nin blasfemantoj, sed antaŭe rigardu nin. Ĉu via ofico ne timigas vin? Rigardu nin!

La kripluloj leviĝas en la litoj. La pastro malrapide levas sian kapon . . . liaj okuloj pligrandiĝas . . . rigidiĝas. Li genufalas teren.

La pastro: Kiel mi povis arogi, imagi min pastro — diri, ke ni estas destinitaj — kia sensencaĵo. Kaptas min teruro kontraŭ ti-kiuj solene enoficigis nin. Mi vidas la abismon, kiun la pastro alpetegas kaj mi volus krei: liberigu vin de la malindaj pastroj. — Ho, Jesuo, viaj ismoj estas fuŝitaj. Kiel do alikaze povus okazi ke ili senforte disfalas. Neniel savo . . . neniam luman vojon mi vidas en ĉi-noktado.

Nenie prenantan manon, pretan senturmentigi vin . . . mem bezonante konsolon, kiel do mi povus doni al vi konsolon, kiun mi mem pli urĝe sopiras ol vi? Kaj kiu povus entrepreni trompi vin per piaj vortoj, vin — antaŭ kies okuloj disŝiriĝis ĉiuj vualoj de nure eta kompato — mi ne povas. Antaŭ vi mi iru . . .

La pastro malaperas.

La kripluloj: Feliĉon! Enviindulo!

En longaj vicoj venas flegistinoj.

La flegistinoj: Ni alportas medikamentojn . . . kompatindaj malsanuloj . . . trinkaĵojn por kvietigi vian soifon . . . ni alportas malvarmetigajn tukojn por mildigi vian doloron . . . ni alportas bonfarantajn pastelojn, kiuj kaŭzas dolĉan dormon.

La kripluloj: Neniel utilas al ni dormo — “fratinoj” . . . morgaŭ ĝemos nova tago — ho, se vi alportus medikamentojn por longa, longa nokto. Ni ne volas vekigi — ni ne volas vekigi!

La flegistinoj: Tro multe vi postulas kompatinduloj. Resanigi vin — jen nia ofico, sed mortigi ne estas al ni permesate.

La kripluloj: Tro malfrue — “fratinoj”. Mizeran flikarton vi plenumas. Kial vi ne antaŭzorgis dum paco. Kial do fliki — jen, vi do povas danci kun gajaj kaj sanaj homoj?!

La flegistinoj: Vi kulpigas nin malprave.

La kripluloj: Ho, rigardu nin kaj diru ankoraŭfoje, ke ni diris tion malprave. Vi ne scias, kiaj vi estas, karaj “fratinoj”. Survestu funebrovestaĵon kaj nigrajn vualojn — ne nomu vian faradon proksimumo. Nomu vian faradon: mizera, bedaŭrinda flikado.

La flegistinoj levas la kapojn. El iliaj buŝoj laŭtigas skuega ek-krio. Tereniĝas. Malaperas. Mallumo. Eklumas la blendlanterno. Antaŭ la tola tabulo ree staras la sep kripluloj. Antaŭ ili la profesoro, studentoj, sanitarsoldatoj.

La profesoro: Estas hazarda feliĉo, ke ĉiuj “kazoj” kunestas. La malsanulojn ni vidos morgaŭ. Mi ripetas, kion mi komence diris! Ni estas imunaj kontraŭ ĉiaj teruraĵoj. Ni povas nomi nin pozitiva fako — la negativa estas la armil-industrio. Alivorte: ni estas la reprezentantoj de la sintezo, la armilindustrio agas analitike.

Scenejo fermiĝas.

El originalo trad. H. Remers.



Hirundo

TAGULO

*Ekbluas, ekbluas, hirundo subsuna,
Dum foren ĝin portasflugilo la nigra
Feliĉe kaj ĝoje de tie ĉi.
Sunbrile kisita de dolĉo aŭtuna,
Kaj suden kaj varmen birdeto la migra
Forflugas de malliberuloj ni.*

*Hirundo! Hirundo! Flugeme facila!
Mi vidis vin supre halteti momenton
Kaj suben rigardi al eta mi.
Ho, birdo la plej rapidemeflugila!
Ja hejmen mi flugus rajdante la venton,
Se, bela migranto, mi estus vi.*

*Printempojn vi venis al ni pacigantoj
Kaj nin ekvidinte apude vi restis
Dum tutaj la longaj someroj du.
Ho, birdo felanda kun etaj la kantoj!
Libere vi vivis, feliĉe vi nestis;
Forgesas mi ne, sed vi jese, ĉu?*

*Ĉu vi, ho, hirundo, ankoraŭ memoras,
Ke grandaj kradegoj kaj feraj seruroi
Enŝlosas kaj kordolorigas nin?
Ke ni, pacigantoj, sklaviĝe laboras?
Ke brutaj gardistoj kaj dikaj ŝtonmuroj
Konsternas, mutigas kaj kaptas nin?*

*Nun vintre mi pensasflugilon la vian
De dolĉo aŭtuna sunbrile kisitan,
Dum flugis vi for de tie ĉi.
Vi poste traflugis hejmlokon la mian
Kaj vidis infanon de mi multamitan,
Do ĉu por mi tiun salutis vi?*

(Verkita en malliberejo).

LA LAMENIGILO

M. LALLEMAND

Estis, en la fumplena fabrikejo, tra la blua lumo falinta el la vitrokadroj kaj la fulma invadego vomita de la fornoj, estis ĉiaj febroj: klakado de la kupraj stangetoj ruĝaj sur la grasaj benkoj; perfidema murmuro de la motoroj; kriegado de la segiloj; spiregado de la vagonetoj direktantaj al la kontrolo la brilajn ringojn; surda ronkado de la blovmaŝinoj; martelado obstina de la pistiloj; timegindaj vibradoj de la akvopremiloj.

Estis precipe, apud tiuj du fornoj kies pordoj ne povis konservi la pezan fumon, la infera bruado de la lamenigiloj, kiuj aŭdigis, plej base, la veran fundamentan muzikon, la bazajn agordojn; kvazaŭ la skizon mem de tiu florado da bruoj venantaj skribi sin per malpezaj notoj akutaj de satana melodio.

Kaj tie, apud tiuj lamenigiloj, la viroj brilnudbruste kuris, kuradis. La pordo por elŝarĝado de la forno glitis balanciĝante; unu el ili, la vizaĝo lavata de lumo, alkaptis la stangon rozkoloritan en la fajro, ĝin trenis al la cilindroj kun palaj rebriloj; la alia, laŭ daŭra movado, ĝin puŝis al la komenco de la kanelaĵo senkompata kiu ĝin ensorbis per kvazaŭa ŝultropuŝo monstreca. Aliflanke, lia kunlaboranto pinĉis la forkureman beston por ĝin oferi al pli malampleksa faŭko. Kaj kvinfoje sama lukto kontraŭ la nerva serpento ora okazis. Laste, malvarma, mortigita, la metalo ĝemis sub la segilo, en furiozado de fajreroj.

* * *

Dudekfoje oni diris al Julio, kiu estis kun ni, ke li faras danĝeran ludon saltante tiel sur la glata ferplanko kie eniĝas la stango. Sed Julio respondis per sia malobeema valona¹⁾ lingvo:

— “Se ci tie-ĉi devas morti, ci ne mortos aliloke!”

Kaj li aldonis:

— “Tio estas la sorto!”

Ofte inter du desegnetoj mi iris ĉeesti tiun inferan turniron, hipnotizata, elŝirata el mi mem de tiu ruĝa ŝtormo kie la maŝino vinktas al sia senkompata artifika vivo la kreaĵojn sentemajn kaj amantajn.

Tiu-ĉifoje mi estis signinta al Julio, pasante, per rideto signifanta: “Tiu malbenita maŝino nin malhelpas diri bonan tagon, sed nenio estas, la koro havas tiun intencon!” Kaj mi memoras, kion al mi diris Julio la unuan fojon, kiam mi lin estis revidinta, kiam li manĝis sian supon varmigitan sur la fornangulo, kun netradukebla prononca maniero: “Kiam mi havis mian folion por veni ĉiu, mi estis plenkontenta, ci devenas!”

Kaj tiun fojon mi estis ĝuste serĉanta la specialiston, sin okupantan pri tiuj lamenigiloj, Alberton, bonan homon kun kiu mi estis

(1) Valonio — sudbelgia regiono.

ĝojigata paroli, la veran kuraciston de la monstro, kiam la submastro atentigis pri malglataĵoj sur la profiloj aŭ pri ia milimetro perdita.

Kvin minutojn poste, sama ondo min portis kun ĉiuj tiuj homoj al la lameniĝilo. "Viro vundokaptita!" Moto kutima kaj terura.

Labirinto da korpoj, tra kiu nenion oni vidas kaj kie oni kun penego trairas. Oni kuras al la skribejo. La virinoj foriĝas, ne volante vidi, poste ili estas venkataj de la logo kaj, unu mano sur la terure korbatanta brusto, proksimiĝas.

"Estas la malgranda Julio"... Mi sukcesis trapasi tiun tremetantan muregon. Li estas tie, la kruro en la plej larĝa kanelaĵo, maldikigita kaj sanga, inter la du cilindroj ankoraŭ turniĝantaj. Alberto estras la funkciigon kiu ne havas finon. Julio instinkte elturniĝis, la vizaĝo al la fornoj, al alia kruro alkroĉita al ferplanko, dum komenco de disŝirado.

Poste ĉiuj ekdisiĝas, la inĝeniero, de ni ĉiuj amata pro liaj bonaj okuloj kaj pro la tuta kvietigo kiun li en si havas, la inĝeniero alvenas kaj tuj prenas la turmentekzekutiton en ambaŭ brakojn, dum la malrapidiĝinta maŝino ankoraŭ surde murmuras, ne volante definitive ĉiun tiun karnon kontuzitan, preskaŭ neniigitan.

Tiam la dolĉa kapo sanktula de mia amiko kliniĝas al tiu de Julio kiun li enbrakigas tra larmoj ne plu rekoneblaj... Vortoj en komenciĝinta silento alvenas: "Mi'edzino, mi'infanetoj..." La cilindroj disiĝis; kaj estas ondo tute simila kiel la unua kiu refluas al la malsanejo, kie la doktoro ĵus alvenis, kun tiu profesia indiferenteco kiu tiom da malbono faras...

* * *

Vespere, en Rouen, Julio demandis, ĉu oni al li tranĉos la kruron. Li ne vidis, sub la kovrilo, la malplenaĵon jam estanta. Oni konsolis, dirante ke nur unu semajno sufiĉos; kaj li ankoraŭ parolis pri sia edzino revenonta Francion el okupataj regionoj kun siaj etuloj... Li sufiĉe frue resaniĝos, eble...

* * *

... Estis pluvinta, sed la suno ridetis pale, tiel timema ankoraŭ! Ĉiu estis tie, en la pavumita korto de tiu malĝojega domo, kien li jam venis kun ni, la malgranda Julio, por enterigo tute sendistinga.

Enterigo de malriĉulo, en urbo kie kutimaj manoj ne levos la ĉerkon kaj aranĝos la kronojn, sed tiu malbelega samaspekteco de la oficiala solidareco.

Ni ĉiuj tie estis, el lia vilaĝo kaj kelkaj parencoj, kiuj povis veni; la direktoro ankaŭ, kies aŭtomobilo reiris. Sed mia amiko restis en la laborejo, kie ies ĉeesto estis nepra, ĉeestinte ja dum la plej malbona momento, kiel ĉiam. Tie estis ankaŭ la malfeliĉulino, vokita por la morto de sia edzo, kiu alveninte antaŭtage de la enterigo, tiun ĉi ĉeestis por povi plori tutlibere.

Ĉar estis enterigo de mobilizito, ok helpsoldatoj, mizeraspektaj kaj enuigitaj de tiu deĵoro tenis siajn pafilojn ĉiuflanke de la ĉerko.

Kaj la meso, en la malvarma kapelo; pastro, kiu tion faris la tutan tagon, kiel la enterigistoj.

Kaj poste, precipe, la longa irado, de unu ekstremaĵo al la alia de la urbo, preter la tramveturiloj kaj kotaj veturilegoj, al tiu tombejo kun krucetoj ĉiuj similaj, kie la Morto vicigis de kvar jaroj siajn preferitojn, la malfeliĉajn viktimaĵojn sentaŭgulojn.

Duonhoro poste, tutsubite, la personaro haltis: la maljuna patrinjo de Julio ne plu povis iradi. Tiam oni petis de la pastro, kiu estis sur la veturilo, ĉu ne estus loketo por tiu multaĝulino...

Ploradoj veraj, ploroj de mizeraj homoj, martelitaj de la ŝtonoj ĵetataj laŭ la modo de tie, en Ardenio, sur la mizeran keston de Julio.

Kaj la premataj raspaj manoj, simple, kiel aliajn fojojn jam, malproksime el tie, aliloke.

— "Tio estas la sorto" ...

Tradukis el la franca L. R. (S.A.T. 1887).

En forĝejo

E. MIĤALSKI

*Mi naskiĝis en bru' de marteloj,
en la fulgo kaj fum' de l'forĝej',
min favoris fajreroj — flamsteloj
kaj forĝejon ekamis mi plej.*

*Mia pup' estis akra ĉizilo
kaj estis fajlil' — violon',
kaj elektris por mi fajra brilo
sur ambosa ŝtalritma sonson'.*

*Flaveruĝis faŭko de flamanta forno,
kie patro mia feron fandis,
kie fajro-monstro flagre-korna
furiozis kaj rubandis.*

*Fajreroj fabelante flirtis,
lulante menson de l'infan',
sed fumo reliefe hirtis,
borante en ĉiel'-cejan'.*

*Kaj feoj preter mi ekpafis
per fajfaj sagoj de fabel' —
profunde mian koron trafis
de la martelo frap' — ribel'.*

*Kaj sur ambos' de novaj formoj
ekhavis fidon la spirit',
kaj de filistraj fio-normoj
mi eksfiliĝis sen hezit'.*

*En filtrado de fajra fontano
fluis jaroj post jaroj for
kaj fadenojn de l'fam' filigrana
por mi forĝis fortuna favor'.*

*Tra forĝej' fulmis frapo frakasa —
kaj falmortis la patro ĉe l'forn';
fendiĝinte fluegis fandmaso,
funebrante pri l'mort'.*

*En la flav' de l'metalo fandita
malaperis por mi la estint'; —
kaj fiere flugas la spirito
for el fulgita labirint'.*

1923, Septembro.

NIAJ LITERATURAJ TASKOJ

L. REVO

(Fino)

IV. BATALANTOJ DE LA RUĜA STELO.

Du gravaj faktoj prepariĝis dume tondris la pafilegoj de la mond-milito.

La proletaria revolucio, malproksime estonta antaŭ la milito, fariĝis nuntempa tasko de la laborista klaso. La proletariaj amasoj leviĝantaj anoncas minace al siaj premegantoj la finon de ilia regado. Kaj kun la subiro de la burĝa klaso alproksimiĝas la fino de la klasika, burĝdirektata periodo de Esperanto-literaturo.

Esperanto pli kaj pli disvastiĝas en laboristaj medioj. Penetrante en ĉiujn partojn de l'popolo, nia lingvo ĉesis esti apartaĵo, ĝi ĉesis esti flankstare evolucianta elemento; Esperanto fariĝis ero de la pulsanta vivo. Ĝi ne plu estas senmova spegulo de la vivo, ĝi jam estas, same kiel la aliaj lingvoj, vivanta esprimo de la vivo.

En Esperanto jam vivas hodiaŭ la animo de la proletariato. La fantomoj kaj kavaliroj de la mezepoko malaperis por ĉiam.

“La revolucio socia, diras Marks, povas ĉerpi sian poezion ne el la pasinto, sed nur el la estonto. Ĝi povas komenci sin mem nur post kiam ĝi forigis ĉian superstiĉon je la estinto. La antaŭaj revolucioj bezonis la mondhistorian rememoron, por timkaŝi al si sian propran signifon. La revolucio proletaria devas lasi la mortojn sub la tero, por ke ĝi komprenu sian propran sencon. Tiam la frazo kovris la signifon, nun la signifo kovras la frazon.”

La kavaliraj frazoj malaperis. La kompreno, ke homara interpaciĝo estas atingebla nur per klasbatalo kaj per revolucio proletariaj, videblege influas la karakteron de la nuntempa Esperanto-literaturo. Revoluciaj kantoj sonas en Esperanto, batalantoj de la Ruĝa Stelo daŭrigas la verkon de la verdstelaj kavaliroj.

Kreskadas en Esperanto proletaria literaturo.

V. AL LA LABORO!

La plua evolucio de Esperanto-literaturo estas tasko de proletariato, de proletaria Esperanto-movado.

Jam delonge la dekadenco de burĝa literaturo estas sendiskuta. La kapitalisma socio ne havas plu defendindajn nek konkirindajn idealojn. Senanima kaj senspirita, ĝi povas doni nek animon nek spiriton al siaj literaturaj verkoj. Defendante malegalecon kaj tiranecon, militegajn kruelajojn, “paceman” perforton kaj “demokratian” teruron, ĝi ne povas inspiri noblajn sentojn kaj altegajn ideojn al la verkoj de siaj artistoj. Kaj ĉar la burĝa socio, malplenigita de ĉio nobla, bela kaj bona, ne povas plu doni enhavon al siaj verkoj, ĝi klopodas kompensi tiun mankon per malespera serĉado de novaj, ofte tute frenezaj formoj. La aparteco de la formo celas forgesigi la vantecon kaj neniecon de la enhavo.

Malrapide eliĝas proletaria literaturo el la burĝa dekadenco. Malrapidege, ĉar nur post la venko de la laborista klaso, post akirita bonfarto de la grandaj popolamasoj, povos vastege kaj amplekse ekflori la proletaria

kulturo en siaj tutaj larĝeco kaj profundece. Palpe ĝi serĉas ankoraŭ novajn formojn, ne ĉiam ankoraŭ ĝi sukcesas disiĝi klare de la burĝa influo. Ankaŭ en proletaria literaturo ni konstatas la serĉon de novaj formoj similante tro ofte la dekadencajn formojn de burĝa literaturo. Tiurilate ni ne forgesu la jenajn vortojn de V. Hugo:

“Kaj la publiko deziras tiun liberecon tia kia ĝi devas esti, akordiĝanta kun la ordo en la ŝtato, kun la arto en la literaturo . . . Interna racio devas troviĝi en la fundo de ĉiuj tiuj novaĵoj. La principo de libereco realiĝu, sed ĝi bone realiĝu. Literaturo, same kiel socio, bezonas nek ceremoniaron, nek anarĥion: sed leĝojn. Nek kalkanumojn ruĝajn, nek ĉapojn ruĝajn.”

Politike malkaŝiĝas en tiuj linioj la dusenca spirito de ĉiu burĝa revoluciulo: batalanta samtempe kontraŭ feŭdala reakcio kaj kontraŭ proletaria revolucio. Sed literature Viktor Hugo estas prava. Ni certe ankaŭ nuntempe bezonas novan literaturon; sed ni ne klopodu disvolvi la arton per krudaj malartaĵoj.

Novaj taskoj vokas, novan enhavon ni devas doni al la literaturo. La sentoj, la ideoj kaj la volo de la klaso, kies venko ebligas la ĝeneraligon de homa civilizacio, devas enkarniĝi en la literaturo. Antaŭ kelke da jaroj, itala kamarado tion jene precizigis:

“Necesaj estas al ni nuntempe verkistoj de la ideo. Ne filozofoj, historiistoj, psikologoj, kiuj amaĉas la arton pro la tezo: ne, ne! Sed verkistoj kiuj sciu — el la necerta, konfuza vokado de teorioj proksime realiĝontaj, de kredoj proksime mortontaj; en la momento kiam nova civilizacio montriĝas — verkistoj, mi diras, kiuj sciu fiksi la signojn de la turmenta serĉado je la nova animo homara kaj la plej novajn aspektojn de la nova vivo de l'spirito, konsekvencoj de komenciĝanta ŝanĝo ekonomia.” (COMUNISMO de Milano, februaro 1920, R. Grieco Pomarici: “Literaturo de dekadenco”).

Jes, el la malluma bruego de la senhalte progresanta transformiĝo socia leviĝas mil problemoj, altirante poezian pritrakton. Novaj ĝojoj, ĝuoj, doloroj, amo kaj malamo, altfiera konscio pri devo kaj honoro revoluciaj, teruraj konfliktoj moralaj, intelektaj, sociaj k. t. p. naskiĝas, novaj aspektoj nekonataj prezentas sin. Sub mil novaj aspektoj ekaperas ĉiuj malnovaj demandoj: amo, devo, kredo, k. t. p. Klasoj estas malaperontaj kaj eĉ malaperantaj, milionope disrompiĝas vivoj, ĉio malnova disfalas, disiĝas dolorege kaj suferplene. Pentri la psikon de la mortantaj kaj de la leviĝantaj klasoj, pentri iliajn luktojn, la aspektojn kiujn prenas tiuj luktoj speguliĝante en iliaj cerboj kaj animoj, interesiĝi pri la individua sorto de la sennombraj homoj, sencele ĉirkaŭpuŝataj en la fermentado de nia epoko: jĉn amaso da plenumendaj taskoj.

Ne estas necese substreki la gravecon de Esperanto je la plenumo de ĉiuj tiuj taskoj. La nuna civilizacio estas multege pli internacia ol ĉiu alia. Pli necese ol ĉiu alia, la naskiĝanta literaturo bezonos lingvon internacian.

Milo da taskoj atendas nin. Al la laboro, gekamaradoj!

Diru vian opinion, atentigu pri novaj celoj, elvoku problemojn pritraktindajn. Ne forgesu ke sur niaj ŝultroj, sur la ŝultroj de la laboristoj Esperantistaj, ripozas nuntempe la estonto de Esperanto!

Al la laboro, gekamaradoj!

La macerado de la tekseblaj kreskaĵoj

PROF. DOMENICO CARBONE

El la tekseblaj vegetaĵoj, iuj (kiel la kotonarbo) havas liberan lanugon; aliaj (kiel la kanabo, la lino k. t. p.) posedas verajn fibrojn, kungluitajn kun la ceteraj partoj de l'ŝelo; aliaj fine (kiel la agavo) estas faskoj da fibroj kurantaj tra la folioj. Tiuj fibroj estas kunetenataj unuj kun la aliaj kaj kun la ceteraj ĉeloj ĉirkaŭaj per specialaj substancoj nesolveblaj, nomataj science *substancoj pektinaj* kaj popole *gumoj*. Tial oni ne povas izoligi la fibrojn, se oni ne estas detruintaj aŭ disrompintaj tiun cementon pektinan. Tiun malgluigon oni nomas *macerado*.

Oni povas klasifiki la metodojn, per kiuj oni *maceras* la vegetaĵajn fibrojn, en tri ĉefajn fakojn:

1-e. *Fizikaj*, subklasifikeblaj laŭ la uzata fizika rimedo, kiel: pervarmaj (bolanta kavo, akvovaporo) kaj mekanikaj (nuremekanika disigado).

2-e. *Kemiaj* (agado de varmaj aŭ malvarmaj solvaĵoj acidaj, alkaliaj, sapaj k. t. p.).

3-e. *Mikrobaj*.

Plue, ĉiu el tiuj rimedfakoj povas esti uzata ĉu por hejma, surkampara laborado, ĉu por la industria, enfabrikeja; unuaokaze ni nomas ĝin *kampara* aŭ *kamparana*, duaokaze — *industria* maceradoj.

Industrie estas uzataj precipe: 1-e. La permekanika macerado, en Ameriko kaj en Afrikaj kolonioj por la agavoj (precipe por *agave sisalana*) kaj similaj folioj, kaj en iuj partoj de Italio por la kanabo. Tiu ĉi kreskaĵo estas tamen tiamaniere fuŝata, ĉar tia fibraĵo estas malbona kaj valoras malmulte; tial la mekanikan maceradon de la kanabo oni uzas nur tie, kie la aliaj malglumetodoj tute ne estas uzeblaj. 2-e. La kemia macerado, por la ramio (*boehmeria spp.*) kaj por la lino, precipe laŭ la metodo Peufaillit¹), t. e. reakciado de varma petrolo sub forta premo en aŭtoklavoj²).

La mikropa macerado estas, male, precipe kampara. Per ĝi oni maceras, de post miloj da jaroj, la ĉefajn tekseblaĵojn, t. e. la linon kaj la kanabon; kaj nur dum la lastaj tempoj — precipe dummilite — praktike kaj pogrande oni komencis enfabrikejigi la kamparajn macermetodojn, unuatempe preskaŭ senŝanĝe, kaj poste pliperfektigi ilin per laŭsciencaj rimedoj.

Ni diras, ke nur lastatempe oni komencis tion fari *praktike* kaj *pogrande*, ĉar pomalgrandaj, ne tute praktikaj provoj (eĉ per nelonge daŭrintaj fabrikejoj) jam estis antaŭe faritaj.

Ĝis nun mi parolis pri *kampara permikropa macerado* sendistinge; sed tiu ankaŭ estas disigenda je pluraj fakoj. En la nordaj landoj, kie la suno ne sufiĉe varmigas, la kamparanoj, sekiginte siajn linon kaj kanabon, disternas ilin sur herbejon, kie alterna agado de suno kaj pluvo (aŭ roso) kreskigas macerigajn ŝimaĵojn (precipe *cladosporium herbarum*), kiuj malgluigas la fibrojn, sed nigrete makulas ilin. Iufoje oni anstataŭas ĉi tiun *rosmaceradon* per *frostmacerado*, dum kiu, eble, la glusolvigaj ŝimaĵoj kunlaboras kun la mekanika agado de la frostoj.

(1) Elparolu: Pefalji.

(2) Aŭtoklavo — speco de metala vazo tre fortika kaj tute fermita, en kiu oni povas varmigi preme likvaĵon super ĝia bola varmgrado (laŭ Ch. Verax).

Sed ĉie, kie estas sufiĉa sunvarmo, oni preferas la *subakvan maceradon*, t. e. oni mergas¹⁾ la linon kaj la kanabon en fosaĵojn, plenigitajn per de la suno pli — malpli varmigita akvo. Per tiu metodo oni preparas la belegajn italajn kanabfibraĵojn de Bologna kaj de Napoli, kiel ankaŭ la famegajn linfibrojn de Belgio kaj Flandrio; kaj tiam metodon oni penis industriigi kiel dirite.

Sed kiamaniere oni industriigis ĝin?

Unuatempe oni starigis fabrikejojn, enhavantajn (krom la tuta maŝinaro por la en- kaj el-mergadoj, por la lavado, por la sekigado kaj por la posta prilaborado de la tekseblaĵo) grandajn varmigeblajn cementajn kuvojn. En ĉi tiujn oni enmetas jam varmigitan, nefluantan aŭ fluantan, akvon kune kun la macerendaj trunketoj, kiuj, maceriginte, estas maŝine aŭ mane prilaborataj per la suprecitita ilaro. Tiuj metodoj estas: la tre malnova de Schenk, kaj la modernaj de Feuillet kaj de Schneider²⁾ — (t. n. *kanalmacerado*).

Sed tiu macerado en la industriaj kuvoj, krom ofte sufiĉa longdaŭro, ne estas tiel regula kaj unuforma, kiel en la kamparaj fosaĵoj: Kial tio? La kialon ni nur tiam komprenos, kiam mi estos iomete parolinta pri la aganta kaŭzo de la kampara macerado.

Jam de post multaj jaroj estis pruvite, ke la macerado estas fermentado, konsistanta el promikroba solvo de la gluantaj, t. n. *pektinoj* substancoj, sed longe oni bataladis pri la demando, kiuj mikroboj igas tiun solvon. Unuatempe oni opiniis, ke tiuj estas amilobakterioj, sed poste oni pruvis ke, kiam ili estas *efektive* izolitaj, ili estas tute nemacerigaj. Vere malgluigaj estas, male, iuj aerobaj baciloj (*bacillus asterosporus*, *bacillus Comesii* k. t. p.), preskaŭ neniam troveblaj en la kamparaj macerejoj, sed kies agado estis industriigita. Ilia malgluado estas tamen tute malsama ol la vera kampar-fosaĵa macerado, de kiu mi distingigis ĝin per la nomo "pseŭdomacerado"; kaj la "pseŭdomacerita" fibraĵo, malhelkolora kaj malfleksebla, estas laborebla nur post forta mekanika lavado, kiu ne sufiĉas tamen por egaligi ĝin al la vere "macerita".

Kio kaŭzas do la veran maceradon?

Nur post longa penado mi sukcesis dum vintro 1916 eltrovi kaj izoligi la solan ĝin nun konatan *vere* macerigan mikrobom, t. e. novspecan bacilon, kiun mi nomis *bacillus felsineus* (de *Félsina*, malnova nomo de l'itala urbo Bologna, kiel mi unuafoje trovis tiun mikrobom). La igata de ĝi macerado estas tute sama, kiel la kamparfosaĵa. Tiu mikrobo estas trovebla en la koto de tiuj fosaĵoj, kiel ankaŭ sur ĉiuj aĵoj, kontaktintaj kun la maceritaj fibraĵoj, eĉ sur la fibraĵoj mem, dum ĝi malestas ekz. en la koto de nemacerejaj fosaĵoj.

Nur uzante *bacillus felsineus*, do, ni povas efektive industriigi la veran maceradon. Sed, kiamaniere ni uzas la mikrobojn por la industria macerado? Generale, la uzmaniero konsistas el aldono de la agontaj malgrandestaĵoj en la macerejajn kuvojn, kie oni starigas poste, daŭrigante dum la tuta maceradtempo, la plej bonajn kondiĉojn por la multobliĝo kaj por la agado de la enmetitaj mikroboj. Tial, se ni uzas, ekz., pseŭdomacerigaĵojn,

(1) Mergi — meti tute ep likvaĵo (laŭ Ch. Verax).

(2) Elparolu: Ŝenk, Feljet kaj Ŝnajder.

ni estas devigataj daŭrigi, krom la plej bona varmogrado, dumtuttempan glugluadon de aero, ĉar malokaze tiuj *aerobaj* (t. e. aeramantaj) mikroboj tute ne agadas. Se oni laboras, male, per *bacillus felsineus*, kiu estas tute *anaeroba* (t. e. aermalamanta), oni ne bezonas tiun aerenmetadon kaj sufiĉas ke ni starigu dum la tuta tempo (t. e. 2 tagoj por la lino kaj $2\frac{1}{2}$ ĝis 4 tagoj por la kanabo) temperaturon de ĉirkaŭ 37° C.

La pseŭdomacerado (laŭ la metodo de G. Rossi) estas nun praktike uzata en iuj francaj kaj anglaj fabrikejoj por la lino; la vera macerado per *bacillus felsineus* estas uzata en la itala fabrikejo de ing. Brunelli di Bassano en Manerbio (provinco de Brescia), kaj nun oni provas ĝin ankaŭ en Germanio.

Krom la lino kaj la kanabo per *bacillus felsineus* oni povas maceri multajn aliajn kreskaĵojn, ekz.: morusa ĉelo, urtiko, stipo, malvo, ramio, agavoj k. t. p.; plue, per ĝi oni povas eltiri amelon el la terpomoj. Sed la plej interesa uzmaniero de tiu bacilo estas ĝis nun, kiel jam dirite, la *industria* macerado de la lino kaj kanabo, ĉar la industriigo de tiu antaŭe kamparana fermentado alportas plibonigojn ĉu laŭ la teknika, ĉu laŭ la porlaborista vidpunkto.

Teknike estas bone, ke oni povu plenumi la tutan laboradon en unu ejo, anstataŭ esti devigataj transporti la macerendaĵon el la kampo ĝis la macerejo, el ĉi tiu ĝis la sekigejo, el tie ĝis la kampara domo, kie oni senlignigas kaj kombas la fibraĵojn; do el tio devenas granda tempoŝparo. Plue la industria macerado estas ebla dum ĉiuj sezonoj; kaj ĉar la macerigtempo estas tre mallongigita (de 7—20 tagoj dum la kamparana ĝis 2—4 tagoj) oni havas ankaŭ spacoŝparon. Krom tio, la industrie macerita fibraĵo estas pli unuforma kaj pli unutipa, ol la kamparane macerinta.

Por la gelaboristoj la industriigo de la macerado utilas: 1-e — ĉar la kampara macermaniero devigos ilin tre malhigiene labori, penante lavi la pezajn sorbintajn kreskajfaskojn kaj ĵeti ilin sur la fosajbordon, dum la laboristo staras en la akvo. 2-e — ĉar la macersezono estas dum la varma jartempo, kiam la kamparanoj havas ankaŭ multajn aliajn laborojn por fari.

Tial la demando pri la industriigo de la macerado estas interesa ne nur por burĝoj, sed ankaŭ por la gelaboristoj, eĉ en proletaria ŝtato.

Milano (Italio). (Originale verkita por "Literatur-Sciencia Aldono".)



ELDONAĴOJ DE S. A. T.

Aĉetebraj ĉe Administracio: R. Lerchner, Colmstrasse 1, III. r.
Leipzig-Stötteritz (Germanio) — Poŝtĉeka konto n.o 6835

| | fr. svis. | fr. fr. | Mk. g. or. |
|---|-----------|---------|---------------|
| Goethe-Faŭsto I trad. Barthelmess broŝ. | 1,80 | 4,— | 0,80 |
| Eklumo en Abismo trad. Else . . . broŝ. | 1,50 | 3,— | 0,60 |
| bind. | 2,80 | 5,— | 1,10 |
| Ni legu kompilita de Brunulo | 1,60 | 3,— | 0,65 |
| Tri verkoj de Tolstoj trad. J. M. | 0,70 | 1,50 | 0,35 |
| Dokumentoj de Komunismo | 1,80 | 4,— | 0,80 |
| Komunista Manifesto | 0,50 | 1,20 | 0,25 |
| For la neŭtralismon de Lanty (II ^a el- dono) | 0,30 | 0,75 | 0,15 |
| Sigelmorkoj po folio (20 p.) | | | 0,50 |
| Malnovaj n-roj de Sennacieca Re- vuo (propagandcele) po ekz. | 0,10 | 0,25 | 0,05 |

LIVERKONDIĈOJ

La livero okazas **nur post antaŭa pago**. Oni pagu **nur per naciaj monbiletoj**. Poŝtmorkoj ne estas akceptataj.

RIMARKIGOJ PRI PREZOJ

Modifoj de la prezoj estas rezervataj.

La **unua** prezkolono montras la prezojn por bonvalutaj landoj en svisaj frankoj. La **dua** por mezvalutaj landoj en francaj frankoj. La **tria** por kurzsuferantaj landoj en germ. markoj oraj: **1 dol. = 4,20 Mk. g. oraj**, pagebla laŭ la taga kurzo en pap. mono.

Por sendkostoj oni aldonu **20%** por registrita sendaĵo **25%** de la pagota sumo.

S.A.T.-anoj sciigantaj la membro-n.ron rajtas depreni **nur 1 ekz.** de ĉiu speco kun **20%** rab.

ESPERANTISTOJ

KLASKONSCIAJ
LABORISTOJ
ĈIULANDAJ

ENPROFUNDIĜU EN LA TENDENCOJN KAJ

MEMBRIĜU

ĈE ORGANIZAĴO DE PROLETARIAJ
ESPERANTISTOJ

**SENNACIECA ASOCIO
TUTMONDA**

SIDEJO: PARIS

KAJ **ABONU** TIES

ORGANON

SENNACIECA REVUO

RED: PARIS. ADM: LEIPZIG

KUN

LITERATUR-SCIENCA ALDONO

RED: MOSKVO ADM: LEIPZIG

NEPREPOSEDU

ESPERANTAJN

VERKOJN

ELDONITAJN DE

ELDONA-KOOPERATIVO

DÜSSELDORF-LEIPZIG

INFOMOJN PETU ĈE:

ADMINISTRACIO R. LERCHNER, LEIPZIG-STÖTTERITZ
COLMSTRASSE 1, III (GERM.)